La Manifesto pri Akvo de
`Inĝenierarto Sen Limoj'

Premiso

La atingebleco je akvo estas homa rajto, agnoskata de Unuiĝintaj Nacioj kiel universala rajto, samkiel ekonomiaj, sociaj, kaj kulturaj rajtoj. La akvo, tiel kiel aero kaj suna lumo, estas nepraĵo por ĉiuj homoj kaj estas nerenoncebla kondiĉo por la vivorajto.
Tial ni konsideras akvon kiel komunan havaĵon, socian havaĵon kundividenda inter ĉiuj, por eviti ke ĝi fariĝu kauzo de militoj kaj konfliktoj inter popoloj. Ekonomiaj havaĵoj, en la merkata funkciado, estas anstataŭigeblaj kaj elekteblaj. La akvo, ĝuste pro sia neanstataŭebleco, ne povas esti konsiderata ekonomia havaĵo au varo.
Tiel do ni kredas ke la komercado de akvo kaj la privatigantaj procezoj de la akva servoj ne estas la ĝusta vojo por garantii tiajn specifaĵojn, precipe en la nacioj kie ne ekzistas socia protektado.

La etika mastrumado de la akvo estas baza aspekto por la konstruado de "alia" estonteco komuna al la tuta homaro. Ni tial opinias ke la regado de la akva ciklo devas garantii travideble la universalan aliron al tiu rimedo, inkluzivante partoprenigajn meĥanismojn de la civitanoj kaj de la komunumoj, de la mastrumado de la disdonigaj fontoj ĝis la elpurigado kaj la kontrolo de la elfluantaj akvoj.
La aliro al akvo devas esti garantiata far la internacia komunumo surbaze de egalrajtecaj kaj solidarecaj principoj kaj per racia kaj subtenebla maniero de ĝia uzado.

Ni rimarkigas

(Datenoj el Raporto: Beyond scarsity: power, poverty and the global water crisis – UNDP 2006 http://hdr.undp.org/hdr2006/)

- la senigon je la ebleco aliri akvon por pli ol unu miliardo da homoj en la mondo. La manko de senriska akvofonto estas unu el ĉefaj kausoj de malsano kaj de malriĉeco. Nepura akvo kaj manko de taugaj sanservoj precipe respondecas pri la 1,8 milionoj da mortantaj infanoj jare;

- la konstateblan malsamnivelecon de alirebleco je akvo. Meze, en Usono estas uzataj 575 litrojn ĉiutage pokape, en Eŭropo 200-300 litrojn, dum en la landoj de la Sudo de la mondo oni vivas per malpli ol 10 litroj. Eĉ interne de la sama lando estas grandaj neegalecoj: la plej malriculoj ofte ne havas atingeblecon al akva distribureto kaj estas devigataj provizi sin ĉe privataj revendistoj kiuj liveras malbonkvalitan kaj tre multekostan akvon. Cirkaŭ du trionoj de la homoj sen aliro al senriska akvofonto vivas per malpli ol 2 dolaroj ĉiutage. Unuiĝintaj Nacioj fiksas al 40 litroj potage la minimumam necesokvanton, dum la OMS asertas ke sub la sojlo de 50 litroj oni povas jam paroli pri sufero pro akvo-manko;

- la laŭgradan redukton de la provizofontoj kaŭze de la poluado kaj de la troa akvelpreno. Laŭ la UNDP taksado, 1,4 miliardoj da homoj en la mondo loĝas en akvobasenoj kie ties forĉerpo transpasas la minimumam nivelon de la natura replenigo. Tio okazas plejparte en regionoj kiuj forte dependas de grundlaborproduktado kie akva qvalito endanĝeriĝis pro poluado (ekzemple la ebenaĵo de la Gangorivero en la suda Azio, la norda Ĉinio kaj la altebenaĵoj en la norda Ameriko) ;

- la troan kaj neelteneblan konsumon de mineralakvo en boteloj. La produktciklo kaj la konsumo de mineralakvo havas altajn mediajn kostojn. Ĉiutage en la mondo oni malplenigas pli ol 200 milionoj da akvboteloj kiujn oni transportas per aŭtoĉaro nutrata per fosilia fuelo. Ĉiu nereciklata botelo daŭras 500 jarojn ĝis la malkomponiĝo. Italujo havas konsuman mondrekordon: 184 litrojn pokape ĉiujare, kompare kun monda mezvaloro (24 litroj);

- la inertecon de la internaciaj organizoj Por atingi jarmilcelojn pri aliro al akvo kaj al sanitaraj servoj antaŭ 2015, bezonas 10 miliardojn da dolaroj ĉiujare. "Povas ŝajni imponan sumon, sed ĝi devas enkadriĝi en la kunteksto. Ĝi estas malpli multekosta ol kvin tagoj da militelspezoj kaj malpli ol la duono de kio la riĉaj landoj elspezas ĉiujare por aĉeti mineralan akvon" skribas la Raporto UNDP 2006.

Ni pretendas:

- la aliron al akvo kiel rajto sankciita de la institucioj lokalaj, naciaj kaj internaciaj kaj garantiiĝita por ĉiuj homoj, tute senescepte, je la kvanto universale considerata efektive tauĝa. Super tiu sojlo, ni petas ke la rajto aliri al akvo mastrumiĝu tiel ke senkuraĝiĝu malŝparo kaj neadekvata konsumo;

- la valoron de la akvo kiel komuna bono de la homaro, ne reduktebla al varo kaj ne submetebla al la ekonomiaj kaj lukraj profitoj;

- la protekton kaj la defendon de la teritorio kaj de la akva rimedo kiel prioritato en la ago kaj en la politika pripenso celante sekurigi viveblecon en nia planedo ankaŭ por la venontaj generacioj;

- partoprenajn procesojn de la komunumoj pri mastrumado de la akva rigadoj, per la kontribuoj de civitanoj, de la organizaĵoj kaj de la movada reto, cele al realigo de publika senpere mastrumada spaco;

- la starigon de internacia fonduso asignata al projektoj celaj laŭ akvaj rigadoj, teritoria mastrumado kaj plutenado de hidrogeologiaj ekvilibroj;

- la travideblecon en la mastrumado, per monitorado de la civila socio, pri la administracioj kaj la elektoj de investoj;

- la neceson raciigi la konsumon de akvo favore al agrara kaj industria uzado, per la forigo de la malŝparoj, per la limigo de la poluado de la akvoriĉa stratumo kaj per la alpreno de taŭgaj reŭtiligeblaj kaj elpurigaj sistemoj;

- publikan, demokratan kaj partoprenigitan kontrolon de la akvaj servoj.

Kiel itala reto de Ingenierarto Sen Limoj Asocioj nin devontigas:

- elteni projectojn kun la celo garantii la rajton al akvo kaj agojn kie akvo depostuliĝas kiel komuna bono de la homaro;

- evoluigi edukadokampaniojn pri la ĝusta mastrumado de la akvoj, en kiu oni substreku kiel protekto kaj gardo de niaj teritorioj eblas nur per la partopreno de ciuj;

- antaŭenpuŝi edukadon pri konscia akvokonsumo, en kiu oni klarigu mediajn sekvojn kaŭzitajn far ties utiligo en boteloj, por kuraĝigi ĝian limigitan kaj konscian konsumon;

- sentemigi la civitanojn, la instituciojn kaj la mastrumantajn organizaĵojn pri la neceso raciigi la akvajn konsumojn, precipe la konsumojn el agrara kaj industria origino, lanĉante la pliigon de pli efika kaj funkcianta agado por la utiligo de akva rimedo.

http://www.firenze.isf-italia.org

Kontaktadreso en Esperanto: <carlomatteini@libero.it>